

Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT
januaro - februaro 2010, n-ro 1 - 2 (1255 - 1256)

Prezo €5

Sennaciulo



**KALKULU LA HELAJN
HOROJN EN 2010.
ĜESTU FELIĈA**

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo – Lanti

Nia dosiero: Etiko en komerco kaj bankaj medioj



Prelegoj dum SAT-Amikara kongreso

Abeloj en danĝero : atesto de du abelbredistoj.

Batalo pri akvo en Bretonio

Elirejo el krizoj

“Louis Guilloux la nesubiĝinto” engaĝita pensisto kaj verkisto de San-Briego. La du kin-filmistoj partoprenos la debaton kun proponota surprizo al la publiko

Multaj debatoj, kunvenoj, ekskursoj ne sufiĉos por malkovri nian regionon. Vi konsentus, ĉu ne ?

Aliĝu la kongreson por festnozumti (bretone “noktfesti”) kaj gustumi krespojn en gaja bretona etoso.

Kiel kutime, estos proponita al la kongresanoj trapasi ekzamenojn laŭ la 2 unuaj niveloj de FEI (Franca Esperanta- Instituto).

Tiuj sesioj okazos sabate matene kaj posttagmeze en kaj proksime de la kongresejo.

Se vi deziras aliĝi al tiuj ekzamenoj, nepre kompletigu la kongresan aliĝilon kaj sendu ĝin antaŭ la 1a de marto 2010, por ke ni venigu ekzamenontojn.

<http://www.esperanto-sat.info/rubrique130.html>

Jarkotizo al SAT – akceptita dum SAT Kongreso en Milano 2009

Argentino	€	27
Aŭstralio	€	52
Aŭstrio	€	52
Belgio	€	52
Bosnio-Hercegovino	€	10
Brazilio	€	22
Britio	GBD	45 (€51)
Bulgario	€	12
Ĉeĥio	€	20
Ĉinio	CNY	45
Danio	€	52
Estonio	€	12
Finnlando	€	52
Francio	€	52
Germanio	€	52
Hispanio	€	40
Hungario	€	12
Italio	€	50
Israelo	€	32
Japanio	JPY	7150 (52 €)
Kanado	CAD	81 (52 €)
Koreio	€	33
Kroatio	€	12
Latvio	€	12
Litovio	€	12
Malagasio	€	5
Nederlando	€	52
Norvegio	€	52
Pollando	€	12
Portugaliao	€	30
Rusio	€	12
Serbio	€	12
Slovakio	€	12
Slovenio	€	12
Svedio	€	52
Svislando	CHF	79 (52 €)
Ukrainio	€	12
Usono	USD	74 (52 €)

Por la nemenciitaj landoj la aliĝo al SAT estas 5 € kaj la PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

Dumviva membreco € 1300

Eblas pagi ankaŭ pere de la konto de SAT ĉe UEA: **satx-s**

Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redakcejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr; TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org>;

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Plenum-Komitato de SAT:

Prezidanto: Jakvo Schram

Ĝenerala Sekretario: Vinko Markovo

Kasistino: Thérèse Sabatier

Membroj: Guy Cavalier, Stefano Herve Gérard Lieblang, Franjo Leveque-Provost, Arturo Prent.

Redakta Komitato - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Vincenzo Charlot, Tonyo Del Barrio, Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Cindy McKee, Gary Mickle, Viola Murasaki, Grazina Opulskiene, Cyril Orsingher, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Franciska Toubale. Enpaĝigas Jakvo Schram.

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T.

Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram, Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 15-a de februaro 2010.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

Kun malfruo ni ricevis informon ke en Beogrado forpasis nia k-dino Letica SAVIC (matr. 35375) Ni kondolencas al la familianoj kaj amikoj el la rondo de SAT.

La 4-an de novembro 2009 mortis 87-jara k-do Modesto RAMELLI (matr. 33158)

Li estis longatempa prizorganto de la filatela servo de SAT, kaj tre aktivis en la esperanta movado de orienta Francio.

Madeleine de Zilah mortis pro koratako la 27-an de novembro 2009a Dum multaj jaroj ŝi kun edzo prizorgis la kvalitan revuon "La Gazeto". Ni kondolencas al la familianoj

1- Prezento de la temo, signifo, diversaj aspektoj,

2- Historio pri komerco

3- Kreo de Banko Etika Eŭropa

1- Prezento de la temo

En la pasinta kongreso de SAT, kiu okazis julie 2009 en Milano, kun Andrea Montagner ni organizis debaton pri etikaj bankoj.

Partoprenis Marina COPA, oficistino de la Banca Popolare Etica el Italio. Al peto klarigi la vorton “etiko”, ŝi prezentis la agadon de sia banko pri tiu temo;

- unue la valoroj: sobereco, travidevebleco, partopreno de la kooperativuloj;
- due administrado per demokrataj kaj lokaj agadoj (70 lokaj grupoj, veraj motoroj de la banko), informo al la kooperativuloj pri ĉiuj monpruntoj kaj taksa-



doj pri ekonomikaj kaj sociaj rezultoj helpe de bonvolemluloj, kiuj intervjuas la pruntprenantojn;

- trie la celo klerigi homojn pri uzado de mono por ebligi kulturajn kaj popolajn interesojn.

Ni eĉ foliumis la vortaron por legi difinon en PIV: etiko estas “scienco pri moralo”.

Mi elektis la titolon de tiu debato “Ĉu bankoj povas esti etikaj?”. Laŭ mi, moralo estas individua sento; tial, mi preferas paroli pri “pli etika” por taksi iun komercon, iun firmon, iun agadon. Plie, gravas taksi la pasintajn agadojn kaj kontroli ĉu la rezultoj similas al la laŭdeblaj deziroj aŭ intencoj.

Nuntempe, eble pro la diversaj krizoj (ekonomiaj, financaj, klimataj), kiujn homaro travivas, etiko iĝas moda vorto. Nepre, endas uzi ĝin en konferencoj, en prelegoj pri politiko, ekonomio, financo aŭ ekologio, eĉ en reklamoj. Ĉu etiko vendeblas?

Do sekve de tiu somera debato kaj pro tro da misuzado de la vorto “etiko”, mi proponas ĉi tiun dosieron en Sennaciulo: “Etiko en komerco kaj bankaj medioj” kaj esperas postajn fruktodonajn interesojn.

El diversaj landoj, kamaradoj klarigas, per ekzemploj, signifon kaj uzadon de etiko aŭ male ekspluaton per komerco kaj bankoj.

2- Historio pri etika komerco

Esprimo “etika komerco” naskiĝis en la 1960-a jardeko en Britio post provo en Usono. En 1964, la oficiala konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Komerco kaj Disvolviĝo sloganis pri “komerco, ne helpo”. Tiel, la esprimo “etika komerco” aŭ “justa komerco” estis diskonigita.

En Vikipedio, oni legas tiun difinon: “Justa komerco estas komerco kun malpli riĉaj landoj kaj sistemo por doni atestojn al produktoj, kiuj akordas kun etikaj reguloj. Tiukaze la produktantoj ricevas justan prezon. Enspezoj el justa komerco estas ofte uzataj por plibonigi la vivkondiĉojn de la laboristoj kaj iliaj familioj, ekzemple per financado de edukaj aŭ sanecaj projektoj.”